

ISSN: 0871-9241

NiaBulteno

JANEIRO-MARÇO 2003 JANUARO-MARTO • Numero 81

Informa Bulteno de Portugala Esperanto-Asocio
Boletim Informativo da Associação Portuguesa de Esperanto

Rua Dr. João Couto, 6-r/cA, PT-1500-239 LISBOA • +351+217141359 • info@esperanto.web.pt • www.esperanto.web.pt



(R.R.)

esperantistoj partoprenas kontraŭmilite

pĝ.5

XIXa Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj
Vila Franca de Xira, 2003.06.14

nepre venu kaj ĝuu — lofian rizon, muzeojn, novan libron,
movadajn klaĉojn kaj esperanton parolatan.

pĝ.4

Braga • Viseu • Aveiro: Pluas la discentriĝo: pĝ.4-5

PIV2
70€!

pĝ.6-9

Nia Bulteno (informa bulteno de
Portugala Esperanto-Asocio)
Numero 81 (jan.-mar. 2003)

ISSN:0871-9241

Redaktoro:

António MARTINS-Tuválkin
Eldonkvanto: 400 ekzempleroj
Komputile kompostita per
Adobe InDesign™ 1.6

Abono (4n-roj, nurekster Port.):
8-ono de landa MA de UEA

Limdato por NB82: 2003.06.20
Finkompostita en: 2003.05.30

**Portugala
Esperanto-
-Asocio
Associação
Portuguesa
de Esperanto**

(*pessoa colectiva de utilidade pública*)

✉ Rua Dr. João Couto 6 r/c A
PT-1500-239 LISBOA

☎ +351 217 141 359

☎ +351 217 933 924

✉ info@esperanto.web.pt aŭ

portugala@esperanto.web.pt

☎ http://www.esperanto.web.pt

Fondita en 1972.04.25

Landasocio de U.E.A. ekde 1979

K-ano A: Faria de BASTOS

Membroj: 69(+125) en 2003.05.29

Monata kotizo: 1,50€

(emeritoj kaj sub-18-jaruloj:

1,00€; malriĉuloj: 0,00€)

Aniĝkoto: 2,50€

GVIDORGANOJ: (ekde 2003.03.29)

Ĝeneral-Asemblea Stabo:

Prezidanto: José MARTINS

Sekretarioj:

Miguel OLIVEIRA

Werther SACRAMENTO

Estraro:

Prezidanto: Faria de BASTOS

VicPrezidanto: MARTINS-Tuválkin

Sekretario: Alcino ALVES

Kasisto: Silva ALMEIDA

Voĉdonantoj: Luís LADEIRA

Gonçalo NEVES

Alexandra G. e Paz

Kontrol-Komitato:

Prezidanto: Vítor MARQUES

Revizoroj: Francisco MELO

Manuel RUAS

NEELEKTITAJ POSTENOJ:

Instruado: (vakas)

Gazetaro: (vakas)

Libro-Servo: Silva ALMEIDA

Al bona ritmo reveni, promesis mi pri la publikigo de *Nia Bulteno*, ĉi tie antaŭ sepdek tagoj. Jen do revenas ĝi, kun 12 paĝoj ĝiskrevelnigita per novaĵoj. Dume, la sekva numero stas jam duonplena, pro kontribuaĵoj kiujn ne eblis ŝovi en tiun ĉi. (Ĉinumere publikiga, jam preskaŭ malfreŝe, raporto pri la februara manifestacio — sed nur naivuloj opinius ke tiu afero estas jam elĉerpita...) Komparante kun numeroj de antaŭ kvin aŭ dek jaroj, klaras la nuna manko de "ekstertemaj" artikoloj kaj malabundo de eksterlandtemaj tekstoj. Tio indikas ke ni, Portugalia Esperantio, havas nun pli multon por raporti. Ĉu do NB pli- (aŭ re-) -grandiĝu kaŭ -oftiĝu? Jen unu diskutindaĵo taŭga por la baldaŭa Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj, kie certe ne mankos temoj. Ĝis tiam salutas via **Red.**

Korektoj al NB80: p.1: "1918-2002" → "1913-2002"; p.2: "1,20 €" → "1,50 €"; "0,80 €" → "1,00 €"; "2,00 €" → "2,50 €"; "kiujn" → "kiun"; p.3: "kisisto" → "kasisto"; p.4: "ceesto" → "ĉeesto"; p.5: "CBT" → "CBC"; p.5: (mapo tro hela); p.6: "infuis" → "influis"; "lastjara" → "2002"; "ktp." → "k.a."; (maltroas unu linio); p.7-8: "Freire Braancamp" → "Braancamp Freire"; p.9: "Ernö" → "Ernô"; "80,00 €" → "70,00 €"; "ankorau" → "ankoraŭ"; p.10: "Zamenoffesto" → "Zamenhoffesto"; p.11: "Martins-Tuválkin, Marta T. Martins, Irina Tuvalkina," → "Irina Tuvalkina, Marta T. Martins, Martins-Tuválkin, "; p.12: "ankau havis" → "havis ankaŭ"; p.14: "estia" → "estis"; p.15: "Vila Franca de Xira" → "Vila Franca de Xira"; p.16: "faras de" → "faras el"; p.16: "vorton 'gufo'" → "vorton 'gufo'"; p.18: "edzino" → "vidvino"; p.19: "tradukkonkursojn de" → "tradukkonkursojn, i.a., de"; ("AM" ne sovita deskren); (mankas "(R.R.)" apud ĉiu foto); p.20: "pouco cada" → "pouco de cada".

Biblioteko: Werther SACRAMENTO

Pedrosa ALVES

(periodaĵoj) Alcino ALVES

(eltondaĵoj) Olga ALMEIDA

(diversaĵoj) (vakas)

Libreldonoj: Franco SIMÕES

Rocha da COSTA

Periodaĵoj: (vd. kolofonon)

Ret- kaj komput-aferoj:

José MARTINS

António MARTINS

Luís MOURINHO

Lokaj Sekcioj: (baldaŭ)

Junulara Sekcio:

Portugala Esperanto-Junularo

Jovens Esperantistas de Portugal

☎ ☎ ☎ ĉe P.E.A.

Honoraj Membroj:

António da Silva ALMEIDA

Alsácia Fontes MACHADO†

Manuel de FREITAS†

Alberto Pedro da SILVA†

Adelino Franco SIMÕES

Manuel de Sousa TEIXEIRA†

Landaj Rerezentantoj:

U.E.A.: Silva ALMEIDA

ILEI: João SANTOS

E.E.U.: Faria de BASTOS

TEJO: Ricardo TOSCANO

TEJA: Alan ROMERO

ILERA: Francisco MELO (CT1CGE)

EJA: Faria de BASTOS

SAT: Pedrosa ALVES

IKUE: Salete dos SANTOS

Assembleia Regional dos sócios da Associação Portuguesa de Esperanto Convocatória

Nos termos do ponto 2.º do Regulamento de Secções Locais desta Associação, aprovado em Assembleia Geral a 2003.03.29, convoco desta associação os sócios moradores nos municípios constantes da lista anexa para reunir no próximo dia 7 (sete) de Junho, sábado, pelas quinze horas, na Casa da Estufa, sita na Gafanha do Carmo, concelho de Ílhavo, com a seguinte ordem de trabalhos:

- 1) Apreciação e votação do projecto de criação de uma Secção Local desta Associação nos municípios constantes da lista anexa e com o nome "Portugala Loka Unua Sekcio / Secção "Plus" da Associação Portuguesa de Esperanto";
- 2) Apresentação e eleição da respectiva Direcção.

Aveiro, 24 de Abril de 2003

O Presidente da Mesa,

Prof. Dr. José Manuel Gaspar MARTINS

AGD Agueda	GDM Gondomar	PVZ Póvoa de
ALB Albergaria- -a-Velha	GMR Guimarães	Varzim
AMT Amarante	ILH Ílhavo	VFR Santa Maria da Feira
AND Anadia	LSD Louxada	STS Santo Tirso
ARC Arouca	MAI Maia	SJM São João da Madeira
AVR Aveiro	MCN Marco de Canavezes	SVV Sever do Vouga
BAO Baião	MTS Matosinhos	TRF Trofa
BCL Barcelos	MLD Mealhada	VGS Vagos
BRG Braga	MRS Murtosa	VLC Vale de Cambra
CBC Cabeceiras de Basto	OAZ Oliveira de Azemeis	VLG Valongo
CMN Caminha	OBR Oliveira do Bairro	VCT Viana do Castelo
CPV Castelo de Paiva	OVR Ovar	VCD Vila do Conde
CBT Celorico de Basto	PFR Paços de Ferreira	VNC Vila Nova de Cerveira
ESP Espinho	PRS Paredes	VNF Vila Nova de Famalicão
EPS Esposende	PNF Penafiel	VNG Vila Nova de Gaia
ETR Estarreja	PTL Ponte de Lima	VZL Vizela
FAF Fafe	PRT Porto	
FLG Felgueiras		

ENSINO:

Exame e Certificado de Esperanto 1

No dia 6 de Junho de 2003, pelas 21:00, será realizada a prova anual de **Esperanto 1**. Os interessados em obter o certificado emitido pelo Delegado da Liga Internacional de Professores de Esperanto (ILEI) em Portugal, deverão fazer o exame com o seu professor ou, os autodidactas, contactar o Delegado da ILEI. A prova será a mesma a nível nacional e terá a seguinte estrutura:

- Texto de Zamenhof (40 lin.)
- 10 perguntas de interpretação
- Pergunta de desenvolvimento (6 lin.)

Os exames serão aplicados e corrigidos pelo professor do respectivo aluno ou pelo Delegado da ILEI. A distribuição dos atestados será efectuada no encontro de Vila Franca de Xira, dia 14 de Junho.

Dr. João José SANTOS

MOVADO:

Ĝ.A. rutine ratifis

Laŭanonce kunvenis la Ĝenerala Asembleo lastan 2003.03.29 kun laŭkutima etnombra partopreno. Laŭplane plenumiĝis la tagordo; estis organelekto kaj konfirma aprobo de la loksekcia regularo. *AMT*

MOVADO:

Alcino IKEKkase

Alcino ALVES ĵus reelektiĝis kiel kasisto de IKEK (Internacia Komunista Esperantista Kolektivo), dum ties kongreso en Bulgario. Li krome anos en la nova redaktkomitato de *Internaciisto*. *AMT*

MOVADO:

Vila Franca de Xira: XIX-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj

09:30 Ariĝo sur la placo de la stacidomo de “CP”, apud la Monumento al la Toreisto.

10:00 Malferma sesio de la Renkontiĝo kaj inaŭguro de Ekspozicio en la Municipa Biblioteko de Vila Franca de Xira.

10:30 Konferenco: Trajtoj de la “nova esperantisto”.

11:30 Lanĉo de la verkaro de Artur Hipácio.

12:00 Vizito al Preĝejo -Muzeo *Mártir Santo*.

12:30 Vizito al Muzeo *Mário Coelho*.

13:00 Komuna tagmanĝo en la restoracio *O Par-ente*.

15:00 Promenado tra la urbo (malnova kvartalo) kun vizito al Preĝejo de *Misericórdia* kaj Municipa Parko.

16:00 Gvidata ekskurso kun vizito al Muzeo *Dr. Sousa Martins* kaj al la riverborda bulvarado de *Alhandra*.

17:30 Vizito al *Quinta Municipal de Subserra*.

18:30 Reveno al Vila Franca de Xira.

La baldaŭan 14-an de Junio, laŭ anonco en NB80:15, okazos en la apudlisbona urbo Vila Franca de Xira la XIX-a Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj. Oni esperas laŭeble grandnombran partoprenon — esperas, kiel ĉiam, kaj iuj eĉ **atendas** ĝin.

Certe ne mankas motivoj: Krom konatiĝo kun la nesuspektitaj vidindaĵoj de tiu municipo, kunvenintoj ĝuos nekutiman ŝancon renkontiĝi: jam konfirmis sian ĉeeston pluraj kaj multjaraj veterantoj kaj vervaj novuloj. Cetere estos prezentita kaj premiere ekdisvendita librforma verkaro de la portugala esperanto-poeto Artur Hipácio (vd. NB54:12).

Interesatoj partopreni nepre sciigu plejeble baldaŭ per mesaĝo al la asocia sidejo (vd. pĝ. 2); endas kvineŭra **antaŭpago** de la komuna tagmanĝo — kies ĉefplado estos **lofia rizo** (jen alia motivo ĉesti). Krom la manĝo, ĉio alia estos senpaga. **AA+AMT**

MOVADO:

Discentren!

Lagunlande

Surbaze de reta kontakto, estis frumaje vizititaj de Nogosanoj du komencantoj en Aveiro kaj plia en Ovar. Rilatoj kun jamaj lokaj esperantistoj (kiuj **relative** multas) ekestis; anonciĝos regulaj renkontiĝoj. **AMT+AGP**

Landkore

Laŭ kutimo de antaŭaj jaroj, en Escola Superior de Educação de Viseu eseo pri

esperanto prezentiĝis kadre de Socilingvistika studfako. Lige kun ĝi kaj kun valora apogo de loka esperantisto Manuel PINGUINHA, la asocia vicprezidanto dufoje ĉiprintempe rekte kontaktis lokajn interesatojn (urbeto *Tábua*) kaj la eseintajn komencantojn (*Viseu*). Regulaj kunvenoj ekos aŭtune. **AMT**

Plinorden

Kvaropa “delegacio” de Nogosanoj (po du, el Oporto kaj V.N.G., inkl. unu P.E.A.-estrarano) vizitis la urbon Braga komence de

EKSTERA MOVADO:

Surstrate unuafoje

■ Werther SACRAMENTO

Finfine, portugalaĵoj esperantistoj eliris el sia kutima silento kaj alfrontis la freŝan stratan aeron!

Kiel movado, kie paco estas unu el ties celoj, eble la plej nobla, ni ne povis ignori la alvokon de manifestacio por-paca, kontraŭmilita, kaj decidis nepre partopreni ĝin. Portante fiere longan rubandon kun la legendo «ESPERANTO, LÍNGUA DA PAZ», nia grupo (Alcino ALVES, Jaime CORREIA kaj la subskribinto; kroma rubandfarinto António MARTINS-Tuválkin ne povis partopreni) kunfandiĝis kun la grandega 80000-homa popolamaso, kiu, la 15-an de februaro, iradis de Placo *Camões*, en longaj premaj vicoj, laŭ strato *Alecrim*, placo *Duque da Terceira*, strato *Arsenal*, Komerco-placo, strato de *l' Arĝento*, placo *Figueira*, kaj finis en *Rossio*, koro de Lisbono.

Nia granda rubando videblis klare meze de la moviĝanta popolamaso. Rigardante ĝin, multaj homoj, ĉefe gejunuloj, demandis min pri la signifo de la vorto "Esperanto". Ni respondis kaj disdonadis klarigajn flugfoliojn, centojn da ili. Dume tondris la sloganoj kontraŭ la milito, ripete elkriataj de ĉiu. Knabino demandis min, kiel diri en Esperanto «Pacon jes, militon ne!» kaj ŝi laŭte ripetis

Pli bona mond(komunikad)o eblas

Programeroj rekte pri esperanto dum la 3-a Monda Socia Forumo (2003. 01.23-26) en *Porto Alegre*, Brazilo:

- *Esperanto: uma alternativa democrática à hegemonia lingüística*
- *O Grito de Eros: ouvidos e olhos abertos para a construção de um mundo justo*
- *Espéranto et les aspects socio-linguistiques de la mondialisation*
- *Esperanto — the neutral international language*
- *Por el derecho a la comunicación: Justicia en la dimensión lingüística*
- *Esperanto: Um instrumento em defesa da cultura lingüística de todos os povos*

Krome, esperantistoj kunorganizis ankaŭ aliajn agadojn. **Jozefo Pacheco**

tiun vokon... en la lingvo de la paco.

Aliaj manifestacioj okazadis en aliaj urboj de la mondo. Kelkaj multe pli grandaj, pli nombraj. Eble tiu ĉi en Lisbono estis ne tiom partoprenata, sed por ni, portugalaĵoj esperantistoj dezitantaj la disvatiĝon de nia movado en Portugalio, ĝi estis tre grava, ĉar la unuan fojon en tre multaj jaroj la nomo "Esperanto" aperis surstrate kaj estis ripetata meze de miloj da homoj idealismaj, la plej fekunda grundo por semado de nia propra idealo de internacia lingvo taŭga por la efektivigo de estonta mondo libera el perforto. ■

majo, kie fortiĝis rilatoj kun loka juna komencant(in)o. Estis fiksita regula renkontiĝo ĉiusemajna (kafejo *S.Brás II*, iama *Mutamba*, en strato *D. Pedro V*, ĵaŭdoj je la 21:00) reklame



al kiu estas afiŝite en strategiaj lokoj de la urbo. Interesatoj anonciĝu al <esperanto_braga@mail.pt>

AMT+AGP

Vizitanta estrarano kaj loka komencanto en tipa pozo...

EKSTERA MOVADO:

Esperanto kaj Civitaneco en Koimbra Forumo

■ *Luís LADEIRA*

«Esperanto kiel eŭropa komuna lingvo por unuigi civitanaran Eŭropon». Tio estis la temo de mia 15-minuta interveno en la forumo «Aktiva civitaneco, pli bona, kaj pli da demokrateco», okazinta Koimbre, la 5-an de aprilo. La ideo estas ke «por ekvilibri la forton de Usono, Eŭropo devas mem forti. Sed tio nur okazos se la Eŭropa Unio (EU) progresos al politika unio laŭ la principioj de la Eŭropa Traktato, t.e., akceptante ĉiujn malsamajn identecojn. Kaj, por tio, EU bezonas neŭtralan lingvon, ĉar nur neŭtrala lingvo respektos samanivele ĉiujn europajn lingvojn (naciaj, regionaj kaj minoritataj lingvoj), kaj permesos la lernadon de ĉiuj eŭropaj lingvoj. La nuna situacio, kiun regas la principo ke ĉiuj naciaj lingvoj estas ankaŭ oficialaj europaj lingvoj, ne nur malhelpas al la bezonoj de pligrandiĝo, sed ankaŭ malpermesas ekvilibritan lernadon de lingvoj krom la anglan, la francan kaj la germanan. Per komuna kaj neŭtrala lingvo, ĉiuj eŭropanoj havos komunan bazon por interkomuniko, kaj EU povas disvastigi la lernadon de ĉiuj lingvoj por defendi la lingvan malsamecon kiel kulturan riĉecon. La neŭtrala lingvo por Eŭropa Unio jam ekzistas de longe. Ĝi naskiĝis en Eŭropo; ĝi estas literatura lingvo; ĝi nomiĝas esperanto. Ĝi respondas tuj al EU-bezonoj.» Dum la forumo estis eta ekspozicio de esperantaj libroj kaj prospektoj. ■

La nova Plena Ilustrita Vortaro jam estas akirebla en nia libroservo. La nova eldono, kiun ĉefredaktis Michel Duc-GONINAZ, estas funde reviziita kaj aktualigita, kun ilustraĵoj lokigitaj ne plu en la lastajn paĝojn, sed en-
korpigita en la tekston mem. Eldonis, kiel antaŭe, SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). Formato: 17×25 cm; 1386 paĝoj. La prezo, mallaŭ indiko en NB80, estas nur 70,00 € (plus pak- kaj eksped-kosto) LS



Utiligi eksPIVojn

Eble vi jam aĉetis la novan PIV-on, aŭ planas tion fari dum la U.K. en *Göteborg*, ĉu?... Do **kunportu la malnovan** kaj ĝin donacu ĉe la libroservo, kaj UEA prizorgos la donacadon de tiuj libroj al homoj kiu ja neniam povos aĉeti tiun tre esencan kaj gravan vortaron. Estu tutmonda! Per eta gesto helpu viajn sam-ide-an-ojn kleriĝi kaj klerigi!

Michela LIPARI

RECENZO:

Disaj komentoj pri la nova PIV

■ *Gonçalo NEVES*

Jen finfine: post longa atendo la nova PIV (aŭ PIV2) trafis en miajn manojn. Dum tri-kvar tagoj mi ĝin traesploris iele-trapele, sen celo kaj akcelo. Mi simple velis kaj krozis tra ĝiaj paĝoj, sena je antaŭjuĝoj kaj postuloj, aperta al surprizoj, ĝojoj kaj ĉagrenoj. Dum mia vojaĝo mi tenis taglibron kaj inkis fasketon da notoj hazardaj kaj disaj, kiujn mi nun dividos kun la legantoj de *Fonto* (*). Ek do!

Kiel Bertilo emfazis en recenzo, presita sur la paĝoj de *Monato*, PIV2 ne enlasis multajn neologismojn. Mi povus eĉ diri, ke la nombro da novaj radikoj estas apenaŭua, kaj nur la fakoj kuirarta, komputika, zoologia kaj botanika — precipe la lasta — iom kontribuis al la leksika riĉigo kaj nuancigo de nia vorttrezoro. Ekster tiuj fakoj la aldonoj estas vere malmultaj.

Post longa kaj multflanka uzateco finfine akiris pasporton: biĵuterio, bonsajo, brodkasti, eŭsko, farniento, gejo, hapakso, hiki, insinui, inteligencio, kidnapi, kozo, mar-fruktoj (jes, ankaŭ kunmetaĵoj povas neologismi!), nifo, pederasto, pejorativa, printi, resurso, samizdato, sponsoro, ŝlagro, zapi.

Malgraŭ same longa kaj multflanka uzateco ankoraŭ ne akiris pasporton kaj devas atendi iaman PIV3: anatifo, berni, ĉendi, dikcio, doso, fabulo, gardero, groba, harniso, kalkeo, kardigano, maskoto, mediokra, miŝmaŝo, mohikano, mustaĉo, notora, paŭpera, piscino, pucelo, sefo, sensuala, silvo, skatologio, stupida,

suveniro (tiun ĉi vorton mi jam legis kaj aŭdis tiomfoje en la tuta daŭro de mia 15-jara esperantisteco, ke mi tute ne kredis, kiam mi ne trovis ĝin sur la paĝoj de PIV2!), ŝaperono, Taĵo (restas la stranga Taĥo kaj elfalis Tago!), treso, vokablo k.a.

PIV-2 enlasis ankaŭ bukedon da vortoj ne tiel ofte uzataj sed laŭ mi necesaj por apliko de la lingvo en la vivo familia kaj socia: burgero, ĉipsoj, dropso, hamburgero (= burgero), pomfritoj, sangrio, ŝnapso. Bedaŭrinde ĝi ne enprenis ankaŭ la vorton bagaso.

Iom surprize aperas en PIV2 neologismoj apenaŭ aŭ tute ne renkontitaj antaŭe, kiujn mi tamen opinias utilaj kaj bonvenaj: klementino (citruso tre simila al mandarino), mudo (perioda haŭt- aŭ karapac-ŝanĝo ĉe insektoj, krustacoj ks), muslo (komuna nomo de duvalvuloj), muslio (matenmanĝa miksaĵo de cerealoj, nuksoj kaj sekaj fruktoj), pirekso (varmorezista vitro por vazoj kemiaj kaj kuiraj), sevo (plantolimfo), skvaŝo (sporto nomata *squash* en la angla), spagato (gimnastika kuŝo de ambaŭ gamboj en rekte kontraŭaj direktoj: *esparregata* en la portugala), stukaĉo (homo, kiu denuncas siajn samsortanojn al aŭtoritatuloj, polico).

Aliajn same paraŝutintajn neologismojn mi ne renkontas kun la sama aprobo: biaso (nemotivita prefero), defensi (igi — teritorion, agron ks — ne alirebla al paŝtobrutoj), drajvi (reĵeti fortege tenis pilkon laŭ streĉita trajektorio; eklude uzi la plej longatingan bastonon golfan),

* Artikolo originale aperinta en *Fonto* 23. 2003:1(265): 21-25; republikigita tie ĉi laŭ aŭtoro permeso.

uperkuto (submentona pugnobato, donita de sube supren!!!).

PIV2 finfine donis imprimaturon al garbeto da vortoj slangaj, kiuj plejparte jam ĝuis tre longan uzatecon skriban kaj parolan: buhto, frandzi, midzi, horso, kaki, porno, vampo. Bedaŭrinde restis ekstere: forniki, fotri, kundo, puo. Kompense eknestis franĉi (stranga varianta de frandzi) kaj la slangasubsenco de melki (kun bela ekzemploteksto de Fernández).

PIV2 preskaŭ neglektas la leksikologiajn klopodojn de Fernando de DIEGO kaj Karolo Piĉ. Duenjo estas eble la sola diegaĵo en la nova vortaro, kaj piĉismojn mi elspuris nur du: femino, hihii.

Da mal-mal-vortoj jam ekzistis en PIV1 tuta stako, kiu restis fundamente netuŝita en la nova versio. Aldoniĝis nur vanui, eble pro ĝia obstina uzateco sur preskaŭ ĉiu paĝo denia plejartikolabunda publicisto: Bernard Golden. Novan PIV-version devas atendi: impedi, hungro.

La efektive uzatajn sed de multaj riproĉatajn aliel kaj alies la nova vortaro enprenis sed brulstampis per la honto-signo (evi). La ĉiam pli popularajn sufiksojn -unt- kaj -ut- ĝi ne ignoris, nomante ilin «eksperimentaj».

Arbitran rompon kun la ĝisnuna lingvouzo PIV2 senĝene faras: kiam ĝi donas netrangentan signifon al la verbo aperti, ne komprenante, ke temas pri speciala kazo, simila al korekti — korekta kaj fiksi — fiksa; kiam ĝi ukazas, ke la dua pli granda urbo portugala de nun nomiĝu Porto, kvankam ĉiuj ĝis hodiaŭ ĝin nomis Oporto; kiam ĝi buleas, ke oni de nun devas nomi lupenoj la bongustajn semojn, kiujn ĝis hodiaŭ ĉiuj sengrince nomis lupinoj, kaj tiel ĝi revenas al la

sufiksotima epoko de Kabe (v. *La Faraono* III, p. 65); kiam ĝi ediktas, ke la aŭtomobila parto destinita ricevi pakajojn, kiun ĝis hodiaŭ ĉiuj senĝene nomis kofro, de nun estu nomata kofrujo; kaj fine, kiam ĝi dekretas, ke virinoj samseksemaj ne plu estu nomataj lesboj, sed lesbaninoj, ne komprenante, ke inter la insulo Lesbo kaj samseksemulino ekzistas rilato tiel svaga kaj jarmile nebula, kiel inter rido sardona kaj la ranunkolo (*sardónion* en la greka), kies toksaĵo provokis ridsimilan kunstreĉiĝon de la vizaĝmuskoloj; aŭ kiel inter la vorto salajro kaj la salo, kiun salajre uzis la romianoj; se hodiaŭ neniu sardone ridas pro ingesto de ranunkolo, se neniu plu salon uzas por pagi salajron, ankaŭ ne plu loĝas sur Lesbo ĉiuj virinoj samseksemaj: la du vortoj fariĝis sendependaj, kaj inter ili ekzistas rilato nur svage kaj prae etimologia, kiu tute ne pravigas ajnan derivon.

Mi apenaŭ komprenas, kial vortoj, enkondukitaj en la malnova PIV kaj tutajn jardekojn insiste uzataj de fakuloj kaj rekomendataj al laikoj, subite suferas mutacion en PIV2 aŭ akiras la honto-etikedon de evitindeco. Jen ekzemple pitĉo, kiu nun resendas al *piĉo 2*: ekde PIV2 virinoj do havu du piĉojn de mal-sama tono! Jen ekzemple bambuso, kiu mutaciis al bambuzo. Jen fine arbedo, vera standardo de niaj botanikistoj, kiuj ĉiam nin regalis per difinoj detalegaj, science pucaj kaj preciozaj: kvankam dum jardekoj ili abunde kaj redunde ludis per siaj arbedoj, kiuj faris subliman trinitaton kun iliaj arboj kaj arbustoj, tamen ili nun rekomendas eviti tiun terminon kaj anstataŭ ĝi uzadi la kunmetaĵojn trunkarbusto kaj tufarbusto!

Separoli pri biologoj, apartan mencion

(nek favoran, nek riproĉan) meritas la enkonduko de sciencaj variantoj signife pli vastaj aŭ nuancitaj, paralele kun konataj vortoj komunuzaj. Jen de nun disponeblas ekzemple la paroj: ajlo — aliumo; fazeolo — fazeoluso; lolo — lolio; kaŝtano — kastaneo; piro — piruso; pistako — pistacio; pruno — prunuso; salmo — salmono; polpo — oktopodo; vesperito — vespertiliono, ktp.

Traesploro de la novPIVa enhavo montras, ke la ĉi-jarcenta Esperanto staras tre alte leksike — eble eĉ tro alte por la gusto de konsiderinda amaso da homoj, kiuj la lingvon uzas por celoj intelekto ne ĉiam tiel altaj, kaj kiuj tial ĉian leksikan novaĵon renkontas kun malkonfido kaj antaŭe preta penso, ke al ili estos trudataj vortoj, nuancoj kaj parolturnoj, kiuj rompos la propagandatan facilecon de la lingvo kaj minacos la trankvilecon de ilia kluba laboro kaj la memfidon de iliaj varbaj demarŝoj. Kvankam mi emas kompreni la argumentojn de tiuj peonoj de la esperanta ŝako, tamen mi ĝojas ĉe la konstato, ke jam tri jarkvinojn mi studas kaj uzas lingvon, kiu kapablas ne nur nomi la du relojn de fervoja trako, sed eĉ ĝiajn horizontalajn trajtojn (ŝpaloj) kaj la distancon, kiun ili tenas inter la relpado (ŝpuro), kaj ankaŭ la ŝtonrompaĵon, kiu ŝtope ilin firmigas (ŝotro), kaj en okazo de bezono, eĉ la agon senigi trakon je tiu ŝtonrompaĵo (senŝotrigi); lingvon, kiu disponas nomojn por ĉiuj partoj de simpla anko: trunko (la longa stango), ŝtoko (la transversa stango) kaj ŝpatoj (la hokoj); lingvon, kiu kapablas paroli pri fostoj streĉe tenataj de ŝtreboj (oblikvaj stangoj) aŭ stajoj (oblikvaj ŝnuroj aŭ dratoj); lingvon, kiu nin regalas per stegoj, kiuj subtenas volbon, arkadon aŭ

masonaĵon de konstruata, riparata aŭ falminaca domo (escoras en la portugala), kaj rungoj, kiuj horizontale rigidigas la piedojn de seĝo aŭ servas kiel ŝtupetoj de eskalo.

Kvankam la riĉiĝon kaj nuanciĝon de la lingvo mi ŝatas kaj aprobas, tamen mi konscias, ke ekzistas danĝeraj limoj flu-sablaj inter la komprenebleco de Esperanto — eĉ flanke de homoj, kiujn logas celoj kulture pli altaj — kaj la kreskanta kripteco de la fakula lingvaĵo, kripteco, kiu estas fortega trajto ne nur de ekspertoj nialingvaj, sed ĝenerale de ĉiulingvaj ekspertoj, ĉar ĝi kunamblas la fakulan deziron apartiĝi de la amasoj kaj starigi ordenojn, loĝiojn kaj korporaciojn, kie ili povas laŭplaĉe ĵongli per siaj ĵargonoj kaj kultivi sian mem asertatan superecon. Se al iu la supraj konsideroj ŝajnas iom tro drastaj, tiu nur legu la sekvan difinon, senpere ĉerpitan el PIV2 (p. 1081):

«staŭla angulo: krita angulo, ĉe kiu la planeopozicio ĝisatingas la maksimuman portancon, super kiu la aviadilo staŭlas.»

Ĉu necesas pliaj komentoj?

Malgraŭ la tono ŝajne riproĉa de la supraj alineoj, tamen mi opinias, kelanuna PIV estas grava antaŭenpaŝo kompare kun la antaŭa versio, mi agnoskas, ke la vasta skipo plurfaka kompetente plenumis sian taskon, spite la malfacilajn cirkonstancojn, en kiuj ĝi devis labori, kaj spite la evidentan degeneron de multaj el niaj movadaj strukturoj — kaj mi rekomendas la verkon al ĉiu serioza esperantisto, kiel modelon de tradicia kaj stabiliĝinta lingvouzo kaj kiel ĉerpejon de buntaj kaj abundaj ercoj plurterenaj. ■

ARANĜOJ:

Internacia parko

■ *Xana*

Okazis en 2002.02.15-16 en *Campo do Gerês* (mun. *Terras de Bouro*) eta esperanto-renkontiĝo. Vojaĝis el Lisbono la samideanoj Irina TUVALKINA kaj António MARTINS, ilia filino Marta, kaj Luís MOURINHO, el Oporto mi, el Avejro Bruno REIS, el *Ovar* José RODRÍGUEZ, el Vigo Antonio VALÉN kaj Suso MOINHOS kaj el Valadolido Rodrigo PORTELA — ĉiuj volantaj la samon: spiriom da freŝa aero, malsatiĝi promenantaj montare kaj kune amuziĝi. Alveninte nek samtempe nek orde, ni tute plenumis niajn celojn. Kun António kiel gvidisto, ni malkovris kial la nacia parko de *Peneda-Gerês* estas interesa kaj bela loko por viziti, sed ankaŭ kiel paŝi montare lacigas nin, pigrajn urbanojn. Ni babilis en esperanto pri pluraj aferoj, kiel normale okazas ene de bunta kaj buntema samideanaro, ni tranoktis en agrabla domo, kaj finfine ni revenis, lacaj sed bonfartantaj pro ĝuinda semajnfino (*). ■


RODRIGO



LIBRO-SERVO:

Ŝildon porde

Ree haveblas posttridek jara elĉerpiteco: Aluminia



ŝildo kun verda stelo kaj «Esperanto — internacia lingvo»; malhela grizverdo, sobra aspekto, 99×62 mm. (Iuj konas ĝin el sur la pordo de nia sidejo.) Mendu (kodo 00.093) kontraŭ nur 2,00 € en la Libro-Servo de nia asocio. **ASA+AMT**

ARANĜOJ:

(*) Post la renkontiĝo en *Gerês* menciita ĉipaĝe, Nogesanoj organizis neformalajn renkontiĝojn eksteroporte du fojojn: *León* (Hispanio), en 04.25-27, kaj *Gafanha do Carmo (Ílhavo)*, en 05.16-18. Ambaŭfoje partoprenis eksterlandaj esperantistoj kaj lokaj komencantoj. **AMT**

Nur du en Pasporta Servo! Mirigante konstateblas en la ĵusa eldono de **Pasporta Servo (2003)** nur du portugaliaj gastigantoj (en oportia *Paredes* kaj lisbonia *Moscavide*). Se vi povas kaj volas gastigi vojaĝantajn esperantistojn kaj tiel mem **riĉiĝi per internaciaj esperantlingvaj kontaktoj, nepre** fariĝu gastiganto de *Pasporta Servo!* Kontaktu paspaserv@wxsnl aŭ la asocion. **AMT**

GAZETARO:

2002 superrigarde

La kvar pasintaj jaroj ne sterilis je mencioj pri esperanto en la portugalia gazetaro. Surbaze de nia eltondaĵa albumo (konsultebla sideje) eblas inventarii 15 tekstojn (1 intervjuon, 3 kronikojn, 5 noticojn, 3 raportojn, 2 reklamojn kaj 1 leteron) specife pri esperanto, kaj du menciojn (en noticoj). El tiuj, du estis (milde) negativaj. Inter publikigintoj de pli ol unu ero menciindas *24 horas*, *Correio da Manhã*, *Expresso*, kaj *Público*. Notindas ke ĝis nun kolektiĝis ses eroj publikigitaj en 1999 kaj sep en 2000, sed nur po du en 2001 en 2002. Se vi trovos pliajn priesperantajn artikolojn, nepre sciigu al la Asocio; kontaktenda responsulo: Olga ALMEIDA. El la publikigitaj en 2002 starigindas:

“António, um Rapaz de Lisboa” *A Capital* **2002.03.21:24**. Temas pri laŭmode personigita intervjuo al nia estrara vicprezidanto, kadre de rubriko pri “nefamaj” lisbonanoj. Lian profilon oni skizas “verde” (ja tio estis antaŭkondiĉo por intervjuakcepto). Teksto mallonga, sed kun pozitiva informado pri esperanto, taŭge malbombasta.

“Língua da Utopia” *Vidas* (dim. supl. *Expresso*), **2002.09.07:14-15**. Malgraŭ la mallerta titolo, jen sufiĉe bona raporto, kun inteligenta prezento de niaj perspektivoj — verkita per nekutime intensa esploro kaj interesiĝo. Danke al tiu ĉi publikigaĵo, nia asocio ricevis tre multajn informpetoj (kies sekvoj longe sentebliis), kaj nian retpaĝaron vizitis en la sekvaj ses tagoj tiom da homoj (ĉ. 880) kiom dum la antaŭaj 60 tagoj! **OA+AMT**

NEKROLOGO:

ges-roj LEDON


Forpasis en 2003.03.03 pro aŭtomobilakcidento **Symilde Schenk LEDON** (nask. 1926), Komitatano “A” ĉe UEA kaj Ĉefdelegito por Brazilo, iama prezidanto de Brazila E-Ligo kaj nuna prezidanto de E-Asocio de San-Paŭlo, kaj ŝia edzo, **Gilbert René LEDON** (nask. 1931), verkisto de politikaj kaj teknikaj libroj kaj artikoloj, kaj aktiva SAT-peranto en Brazilo. Tio estas grandega perdo; ili estis treege gravaj por sia ŝtata, landa kaj kontinenta movadoj: Symilde nun estis la plej fidela disvastiganto de UEA en Brazilo, absolute aktiva kaj rigora Ĉefdelegito. Do ankaŭ en monda skalo la Esperanto-movado perdis! Gilbert Ledon estis polemika homo sed granda figuro de nia movado. Ili ambaŭ vivis kaj vivigis Esperanton ne nur (sed ankaŭ) en sia hejmo: Ili redaktis, verkis, organizis kaj tute lokajn kaj internaciajn aranĝojn, kaj ilin partoprenis. Nekrologoj povos nur tro pale priskribi ilin ambaŭ. **James PITON**




(R.R.)

Unu el la lastaj fotoj de Gilbert LEDON (deks.), jen kun portugala esperantisto Pedrosa ALVES.

(R.R.)



(R.R.)



(R.R.)



ASOCIA LOGOTIPO:

3 proponoj!

Sekve de sciigo en NB79:5, ni ricevis jam tri proponojn por la estonta logotipo de P.E.A. Sendu ankaŭ vi proponon!

Konkursregularo

1. Logotipo trafe simbolu kaj esperanton kaj Portugalion.
2. Logotipo estu formate kompakta (pleja oblongo: 2×3), grafike simpla sed originala. (Pseŭdheraldika emblemo kaj simpla tekstkompostajo malrekomendatas.)
3. Propono inkluzivu klarigan tekston kaj uzekzemplojn (inkl. unukoloran varianton).
4. Ĉiuj proponoj ricevitaj ĝis 2003.07.31 estos kribritaj laŭ la kriterioj en §1-3.
5. Panela ĵurio elektita el la efektiva membraro elektos elinter la proponoj kribritaj laŭ §4. Decido publikigos en NB83.
6. Logotipa kopirajto perdiĝos favore al P.E.A. AMT

REMETENTE:

Associação Portuguesa de Esperanto

Portugala Esperanto-Asocio

Rua Dr. João Couto, 6-r/cA

PT-1500-239 LISBOA

PORTUGAL

DESTINATÁRIO:

nº de sócio
anunero

últ. quota paga
lasta kotizpago

foto